


LA JUNIA VIVO



ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

Kateto kaj museto.

Skribis kato-lipharulo al museto belulino:

„Ne forgesu min viziti, mia kara najbarino!
Preparitajn en la kelo mi jam havas lardon, lakton,
Ni festenos ambaŭ kune — kia ĝuo! — tutan nokton!”

Sed museto, ruzulino, diris al ŝi: „Kia miro?

Avarulo-lipharulo volas esti kavaliro?

Mi divenas, kia estus fino de la festenbruo!”

„Mangŭ mem!” ŝi tuj respondis, kaj ŝi restis en la truo.

Laŭ ĉeĥa modelo trad. Vlasta Ruricková (14-j.), Olomouc, Ĉeĥoslovakujo.

Kalkul-tasko.

A

B

x...x...x...x...x...x...x...x...x En grandaj ŝtatoj (ekzemple en Sovetio, Usono, Kanado) ekzistas fervojlinioj tre longaj, multajn milojn da kilometroj. Ni imagu, ke sur tia linio de A ĝis B forveturas ĉiutage noktomeze (precize je la 0-a h) po unu rapidegtrajno de A al B kaj de B al A. La veturo daŭras 7 tagnoktojn (precize 7×24 h). Kiom da rapidegtrajnoj renkontos ĉiu rapidegtrajno dum sia septaga veturo?

J. Rebicek, Ĉeĥoslovakujo.

Sendu la solvon al TJO-Centro antaŭ 1 januaro. Inter la ĝuste-solvintoj ni lotumos premion.

Karlo estas malsana.



Karlo kuŝas en la lito. Li estas tre malsana. Ĉu vi scias kial?

La patrino faris por Karlo novan mantelon. Sed Karlo diris: „La mantelo estas malbela! Mi ne volas porti ĝin! La knaboj ridas pri mi!”

La patrino diris: „Nun estas tre malvarme, ĉar estas vintro. Vi do devas porti mantelon, alie vi morgaŭ estos malsana.

Sed Karlo estis malobeo. Kiam li estis ekster la pordo li metis la mantelon sur barilon.

Tial li nun malvarmumis, kaj li multe tusas. Nun li kuŝas en la lito, kaj la kuracisto estas ĉe li. Li diras: „Mi donos al vi medikamenton, kaj vi ne povas iri al la lernejo. Post tri tagoj mi revenos.”

Karlo estas ĉagrena, ĉar la aliaj infanoj povas ludi sur la strato. Sur la tablo ĉe la lito estas fruktoj kaj limonado. Sed Karlo ne ŝatas tion. Li estas tro malsana!

Respondu al jenaj demandoj: Kiu estas en la lito? Kiu sidas ĉe la lito? Kio estas apud la lito? Sur kio sidas la kuracisto? Kial Karlo estas en la lito? Kio estas en la lito? Ĉu la kuseno estas blanka? Kia estas la lito? Kio estas sur la tablo? Kio estas en la glaso? Kial Karlo ne iras al la lernejo? Ĉu Karlo estas obea knabo? Ĉu estas piro sur la tablo? Ĉu la kuracisto havas longajn harojn? Kia estas la jako de la kuracisto? Kio estas en la vazo? Kie estas la vazo? Ĉu la tablo estas rŭnda?

En la zoologia ĝardeno.

La afabla, maljuna sinjoreto kun la petolaj okuloj sidis sur la benko ĉe la galerio de la rabobirdoj. Apud li sidis tre moviĝema sinjorino kun granda sako plena de buterpanoj.

Li klinis sin al ŝi, kaj demandis: „Ĉu vi scias, kial la leonoj havas tiom grandajn kapojn?”

Kun plena buŝo la sinjorino mire kapneis

„Ĉar alie ili metus la kapojn tra la bariloj”, murmuris la sinjoro ĝentile, kaj forpromenis. Kŭn petola kapsaluto.

Profesoro en la meteorologio.

Falb, profesoro en la meteorologio, veturis kun sia veturigisto en sentegmenta veturilo. Ili vidis kamparaninon, kiu portas la lavaĵojn en la domon.

„Ho, kara virino!” diris Falb, „Vi tute ne bezonas fari tion! Ja estas belega vetero!”

„Post unu horo pluvos”, ŝi respondis.

„Kiel vi tion scias?”

„Tion mi vidas laŭ nia Brunulo (bruna ĉevalo): Kiam tiu fro-
adas sian postaĵon sur la pordo, tio signifas ke baldaŭ pluvos.”

La profesoro ridetis, kaj diris al la veturigisto: „Strange, tiu
superstiĉo ĉe la homoj!”

Baldaŭ la ĉielo malheliĝis kaj post unu horo pluvegis. Ambaŭ
viroj fariĝis tute malsekaj.

Kiam ili ree pasis la farmdomon, la virino ree venis eksteren
kaj diris: „Nu, ĉu mi ne bone antaŭdiris?”

„Tiu besto havas pli da saĝo en sia vosto ol la profesoro en
sia kapo!” murmuris la veturigisto.

La altvaloraj ŝtonoj.

Nobelo vizitis unu el siaj farmuloj. Li estis pompe vestita kaj
portis ringon kun du ŝtonoj de alta valoro.

La farmisto diris al li: „Pro kio utilas al vi tiuj ŝtonoj? Kiun
profiton vi tiras el ili?”

„Neniun profiton”, respondis la nobelo.

„Nu, sinjoro, mi estas pli bonŝanca ol vi, ĉar mi havas du alt-
valorajn ŝtonojn. Ili utilas al multaj homoj, kaj mi gajnas per ili
pli ol dumil guldenojn ĉiujare.”

La nobelo volis vidi tiujn ŝtonojn, kaj la farmulo kondukis lin
al siaj muelŝtonoj.

Respondu skribe: Kiun vizitis la nobelo? Kiel aspektis la nobelo? Kion
li portis sur la fingroj? Kion demandis la farmisto? Ĉu la ŝtonoj de la nobelo
estis utilaj? Ĉu ankaŭ la farmisto havis ŝtonojn? Ĉu li povis porti ilin? Ĉu
ili estis utilaj por li? Kie estis la ŝtonoj?

Nia Majstro.

Preskaŭ ĉiu nacio havas vicon da eminentaj scienculoj kaj artis-
toj, kies nomoj estas ĝenerale konataj. En la lernejo vi aŭdas pri
iliaj agoj kaj verkoj. Kelkaj el tiuj ĉi eminentuloj estas konataj
kaj estimataj en la tuta mondo.

Al tiuj ĉi apartenas ankaŭ d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Li
havis tre noblan koron. Ĉion, kio estis en lia animo plej bela kaj
plej bona, li metis en sian verkon: Esperanto. Por ĝi li oferis ĉion:
sian liberan tempon, monon, eĉ sian sanon.

La 15-an de decembro ni rememoras la tagon de lia naskiĝo. En
tiu monato ĉiuj esperantistoj aranĝas feston al la honoro de d-ro
Zamenhof, la granda bonfarinto de la tuta homaro!

El „La Vojo”.

INTERNACIA VILAĜO POR INFANOJ.

En la kantono de St. Gallen, Svisujo, apud la urbo Trogen, oni nun konstruas internacian vilaĝon por infanoj. Ĝi estas la unua tia en la mondo, kaj en ĝi loĝas geknaboj, viktimoj de la milito.

Ĉiuj infanoj estas orfoj, sen patro, sen patrino, kaj multaj el ili sen gefratoj.

Unu el ili estas Vladimir. Nur naŭ jarojn li havis kiam li venis al Pestalozzi-vilaĝo, sed lia vizaĝo similis al vizaĝo de plenaĝulo, kaj ĝi estis malmola kiel ŝtalo. Lia korpo estis malgrasa kaj laca. Sed liaj pensoj estis viglaj, kaj li turnis ilin suspekteme al ĉiuj.



Li neniam havis hejmon. Same kiel miloj da eŭropaj infanoj, li perdis ĉion kiam la milito venis al lia urbo: patron, patrino, parencojn, eĉ bonvolemajn fremdulojn kiuj provis prizorgi la bebon Vladimir antaŭ ok jaroj en Varsovio.

Kiam Vladimir kun aliaj polaj infanoj venis al Pestalozzi-vilaĝo li ne povis kredi ke la afero por li estos pli bona. Dum sia tuta vivo li devis iri de unu loko al alia, ĉiam sen hejmo. Eĉ kiam li kaj liaj kunuloj en Pestalozzi ricevis grandan domon por si mem, Vladimir rifuzis malpaki sian valizon. „Kiel utilos!” li diris, „Ni denove devos migri!”

INTERNACIA JUNULARKUNVENO.

Pro foresto de la loka organizanto (s-ro Chilard loĝis dum kelka tempo en Anglujo) ni ne ricevis detalajn informojn pri la I.J.K. 1949 en Versailles. — Nur al la nederlandanoj ni povas sciigi, ke momente vojaĝo de Roterdamo al Parizo (tien kaj reen, per komuna bileto) kostas 30 guld. — Do: jam ekŝparu!

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Ĉeĥoslovakujo: Junaj geesperantistoj, 13-20-j., petas il. kartojn k. leterojn el la tuta mondo. Resp. certa. Esp. Servo, Sumavska 250, C. Budejovice.

50 gelernantoj (14-j.) dez. kor. kun gelernantoj de la tuta mondo. Adr.: Ant. Rauwolf, fakinstruisto, Ml. Boleslav II/672.

15 gejunuloj (10-20-j.) dez. kor. Skribu al Frant. Masek, Tr. krále Jirího 17, Karlovy Vary.

Letervesperon aranĝas en januaro Esperantista klubo, Bělehradská 3, Karlovy Vary I. Skribu multnombre. Respondo garantiata.

Francujo: Fraŭlino Josiane Roudaut, rue de l' Eglise, Hydrequent-Rinxent (P. d. C.) dez. kor.k. ĉiuj landoj kaj interŝangi poŝtkartojn.

7 francoj, 14-15-j. liceanoj dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn kun junaj amikoj el la tuta mondo. A. Frangeul, 42 r. du Pré-Pigeon, Angers (M et L).

Germanujo: Carl-Fr. Tholen (20-j.), Genslerstr. 11, Hamburg 33, deziras kor. poŝtkarte kaj letere kun ĉiulandaj gejunuloj.

23-j. instruistino dez. por si kaj por junulargrupo leterinterŝanĝon. M. v. Waldowski, Birkenwerder bei Berlin, Fontanenweg 40.

La Esperanto-Rondo de la Kristana Asocio de Junuloj (C.V.J.M.) sukcesis enkonduki Esperanto-kursojn. Oni sendu al la asocio kiom eble plej da simpatileterojn! Adr. (23) Bremen, Lerchenstr. 2/4.

Nederlando: Mi dez. kor. kun ĝardenkulturistoj en ĉiuj landoj. Mi estas frukt- kaj legomkulturisto. A. Blauw (18-j.), Kilpad B 77, Heerhugowaard-Z.

Instruisto (edziĝinta; 2 infanoj) dez. kor. kun gesamideanoj en Danujo, Svedujo, Norvegujo aŭ Finnlando. Adr: C. W. Schraa, Alb. Cuyprstr. 123, Amsterdam-Z.

Norvegujo: 7-jara knabino, Birgita Anjer, Oberst Rodesweg 76, dez. interŝ. bildkartajn salutojn kun samaĝaj infanoj ĉiulandaj.

• Por diversaj legantoj finiĝos la abono per la decembra numero. Tiuj multe helpos nin, kiam ili pagos sian kotizon antaŭ la 25-a de decembro! Ni jam antaŭe dankas. (Vidu la lastan paĝon).

Por pagoj oni ankaŭ povas uzi la TJO-konton ĉe UEA.

Polujo: 18-j. studento dez. kor. kaj interŝ. poŝtk. kaj poŝtm. kun la tuta mondo. Afranku filatele. Miroslav Kierkus, Pabianice, Nowa 6.

Svedujo: 15 geknaboj (lernantoj) kaj ilia instruisto dez. kor. kun la tuta mondo. Adresu: M. Markheden, Hishult.

Belgujo: Geamikoj! la belga TJO-Sekcio bezonas MONON por sia propagando kaj vi ege helpas ĝin kiam vi aĉetas ĝian belegan, (mane) artefaritan kalendaron. Prezo: Belgoj pagas 10 bfr., francoj sendu per poŝtm. 40 ffr, nederlandanoj f 0,75; el aliaj landoj oni sendu 3 resp. kuponojn, al R. Borremans, r. de Bériot, 2a, Bruselo. — Helpu nin vendi 200 kalendarojn!

Helpu la portugalan esperantistojn! La port. esp. movado renaskiĝis nun sub la malsimpatia rigardo de la registraro, tial ĝi bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj. Ĉiu sendu unu esperanto-libron por la „Cirkulanta Biblioteko” al Portugala Esperanto-Ligo, Apartado 125, Lisboa, N.

„Paco kaj Justeco”, sekcio Bruĝo de la Flandra Ligo Esperantista, ŝatus ricevi por sia verda kabaredo „La Bruĝaj Piratoj” tekstojn de mallongaj sed spritaj teatraĵetoj. Kiu disponigas taŭgajn programpunktojn por varieca vespero? Ni pretas pagi honorariojn. Sendu ĉion al „Paco kaj Justeco”, Nieuwstr. 54, Brugge, Belgujo.

<p>INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO” belaspekta libreto, enhavanta 30 kantotekstojn kun muziknotoj. Prezo 0,75 guld. Mendu ĉe TJO-Centro.</p>	<p>Propagandu per la TJO-Poŝtpapero 50 folioj kaj 50 kovertoj: 2.— gld 50 kartoĵoj: 0,75 gld. Mendu ĉe TJO-Centro.</p>
<p>T.J.O.-BROŝURO Ilustrita libreto, raportanta pri la dek jaroj da T.J.O.-laboro kaj pri Denaska Esperantistaro, enhavanta liston de perantoj, kotizoj, ktp. Prezo 0,20 guld. (1 respondokupono).</p>	<p>BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO” aĉeteblaj de la jaroj: '34/'35, '35/'36 kaj '36/'37. Perfekta materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj. Prezo po 1.— guld. Mendu ĉe TJO-Centro!</p>
<p>UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO estas la ampleksa tutmonda Esperanto-Organizaĵo, kies supertendenca, neŭtrala sinteno permesas la aliĝon de kiu ajn Esperantisto. Per sia delegita reto, kiu ampleksas preskaŭ la tutan mondon, ĝi donas altvaloran servon al la praktika Esperantisto, por kiu la jarlibro de UEA estas konstanta konsultilo.</p> <p>Petu senpagan prospekton ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.</p>	
<p>SVEDA ESPERANTO-GAZETO „LA ESPERO” jam trovis admirantojn tutmonde pro interesa enhavo, bela preso kaj regula apero. Se vi deziras aboni ĝin dum 1949 vi povas pagi la abonkotizon: 4,45 guld. (ŝ. 8,40; fr. fr. 440) al ni, kaj vi ricevos rekte el Svedujo ĉiumonate 8-, 12- aŭ 16-paĝan numeron, ĉefe esperantlingvan.</p> <p>T.J.O.-Centro, West-Graafdiijk (NH), Nederlando.</p>	

PERANTOJ KAJ KOTIZOJ.

(La unua sumo rilatas la kotizon de la 8-p. organo (do por asp. TJO-anoj); la dua la kotizon por abonantoj, aktivaj- kaj subt. TJO-anoj).

Aŭstrujo: J. L. Germela, Thongasse 5/3/12, Wien 111/40	ŝ. 4.—	ŝ. 9.—
Belgujo: S-ro Ph. Cullus, 36 rue du Radoux, Braine-le-Chateau; ĝironumero 806765	fr. 16.—	fr. 40.—
Brazilo: Luiz Bartolomeu, Caixa Postal N 201; Est. S. Paulo, Bauru	kruc. 7.—	kruc. 17.50
Britujo: F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales	ŝil. 2.—	ŝ. 5.—
Ĉeĥoslovakujo: Fr. Masek, Tride Krále Jirího, 17 Karlový Vary. Ĝironumero: Č. 2.331	kĉs. 19.—	kĉs. 47.—
Danujo: Kaj Pedersen, Chr. Hansensvej 4, Hol- baek	kr. 2.—	kr. 5.—
Finnlando: Allan Mehtonen, Onnentie 23, Hel- sinki-kä	fmk. 50.—	fmk. 125.—
Francujo: Roger Bizet, Wierre au Bois, par Samer, (P. d. C.), ĝironumero: Lille, 182135	fr. 100.—	fr. 250.—
Germanujo: R. Uhde, Kornstr. 156, (23) Bremen	M. 1.50	M. 3.50
Germanujo (Usona Zono): Günther Schaedel, München 22, Kaulbachstr. 61	M. 1.50	M. 3.50
Hispanujo: Octavia de Diego, Baltazar Gracian 12-3º, Zaragoza	pes. 4.—	pes. 11.—
Hungarujo: I. P. Balkanyi, 507, Budapest. 2. Literatura Mondo, Budapest VIII, Rökk Szil- lardstr. 28	frt. 4.50	frt. 11.—
Irlando: Seosamh O Conaire, O.S. Miss Plo- wer, Dunkellinstr., Laughrea, Co Galway ...	br. ŝ. 2.—	br. ŝ. 5.—
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartoleo d'Alviano, Trieste P.ĉ.k. 115277	L. 150—	L. 375.—
Maroko: Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba 1, Marrakech; ĝironumero: „Rabat” c/c 368.9 z/	fr.fr. 100.—	fr.fr. 250.—
Nederlando: TJO-Centro, West-Graafdiijk, ĝiro- numero: N. Kool, 382363	gld. 1.—	gld. 2,50
Polujo: Benedict Palczynski, Reda k. Gdynia ...	zl. 120.—	zl. 300.—
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferra, Rua b 28-2º D-to Lisbono	esc. 9.—	esc. 23.—
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ¹ , Stokholm. Ĝironumero 252674	kr. 1.35	kr. 3.50
Svisujo: S-ino Angele Mon, Hauptstr. 199, Rheineck	fr. 1.62	fr. 4.—

Denaska Esperantistaro: Oni povas pagi la kotizon al la landaj ĉefperantoj de TJO. Britoj povas pagi al la brita sekretariino: S-ino G. P. Weston, 27 Cecil Rd., London N 10. Por anetoj ĝis 6 jaroj la kotizo sumiĝas la duonon de la kotizo por aspirantaj TJO-anoj.

Bonvolu bone atenti, ke en la supra listo estas diversaj ŝanĝigoj, kompare kun la laste aperinta listo de perantoj.